

**Bulteno eldonita de la
Esperanto-Federacio de
Langvedoko-Rusiljono**



esperanto
France

Sudfrancia

stelo

N° 193

Bonvolu sendi viajn informojn,
fotojn artikolojn, kaj novaĵojn
al Christian MOURE 15, rue
du Verdier 34120 TOURBES
(xianmoure@orange.fr)
Dankon al ĉiuj por viaj
kontribuoj al SFS.



Amikaro



36a INTERNACIA SEMAJNO de ESPERANTO 21a-28a de aŭgusto 2010 en « Le Lazaret » Sète

Kiel kutime, oni organizas kradrostadon (grillade): ĉiuj federacianoj aŭ aliaj vizitantoj estas invititaj partopreni.

Ĝi okazos **ĵaŭdon la 26an de aŭgusto ek de 19a-h**. Oni nepre sin anoncu al J-F Passarella 04 67 39 16 30 (post la 19a-h) jf.passarella@free.fr. Prezo de la vespermanĝo: 15€ pagebla surloke.

<http://pagesperso-orange.fr/nikolao/esperanto.html>

AŬTUNA KUNVENO la 16an de oktobro 2010 en Sète – « Le Lazaret »

La kunveno okazos de la 10a-h ĝis la 17a-h en la feriejo « Le Lazaret » kie kutime okazas la Internacia Semajno de Esperanto finaŭguste kaj kie paske 2011 estos pli grava evento: Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo (IREM 2011). Estas do okazo por malkovri la lokon por tiuj kiuj neniam ĉeestis. Nia Federacio invitis al tiu komuna renkontiĝo kiu estis dezirata de la franca esperantistaro. La sukceso de IREM 2011 dependas grandparte de ni. Ni alvokas al partopreno sed ankaŭ al kunlaboro de ĉiuj dum la renkontiĝo : unu tutan tagon, duonan tagon aŭ kelkajn horojn. Necesas personoj precipe por la akcepto, por gvidi la partoprenantojn ĝis la loĝejo, por helpi enbusigi la ekskursanojn.

Pli estos da helpantoj malpli « peza » estos la helplaboro!!

La plej grava temo de la tagordo de nia kunveno estos IREM2011, krome ni diskutos ankaŭ pri la kutima vivo de nia federacio: novaj membroj post la diversaj asociaj foiroj de septembro, anoncoj de la lokaj kunvenoj kaj Z-tagoj, listigado de la diversaj kursoj. Federacianoj multe vojaĝis-ĝos ek de majo ĝis oktobro. La partoprenantoj al la Azia Kongreso en Mongolio raportos bilde pri sia vojaĝo kaj partopreno al la kongreso.

Por partopreni al la kunveno oni nepre sin anoncu por mendi la komunan tagmanĝon al J-F Passarella 04 67 39 16 30 (post la 19a-h) jf.passarella@free.fr. Prezo de la tagmanĝo: 15€ pagebla surloke. La akcepto komencos ek de 9a-h 30 kafo kaj kuketoj bonvenigos vin!


Le militant Serge œuvre pour l'essor de l'esperanto

MIDI-LIBRE Vendredi
18 Juin 2010

ASSOCIATION

→ Serge Eysseric
préside le club local
avec passion

L'esperanto a trouvé son défenseur à Montferrier en la personne de Serge Eysseric. Cet ancien prof de chimie en prépa à Joffre a démarré l'apprentissage à la retraite. « J'ai toujours voulu m'y mettre. » Il préside aujourd'hui le club local sous l'égide de l'Aqueduc, ainsi que le centre culturel esperanto de Montferrier. L'idée un brin utopiste, « une langue dont la vocation est de faciliter l'intercommunication entre les gens », le séduit. « Tout le monde a sa langue maternelle, apprenons une langue fraternelle. » La suprématie de l'anglais à travers le monde l'insupporte. « Cette iniquité confère trop d'avantages aux



Pour Serge Eysseric, « l'esperanto a un rôle à jouer ».

locuteurs de cette langue, tant au niveau économique que culturel. La Grande-Bretagne consacre un effort de 26 € pour l'enseignement des langues étrangères, la France 126 €. Le pays le moins européen a imposé sa propre langue. » Il regrette que l'Éduca-

tion nationale ait toujours refusé qu'elle devienne langue optionnelle au bac.

Son intérêt pour l'esperanto ne puise pas que dans la politique, la linguistique aussi. « Cette langue a une vertu propédeutique. On en apprend beaucoup sur sa lan-

gue maternelle à travers l'esperanto. » Il est intarissable sur la facilité d'apprentissage. Serge Eysseric a essaimé sa passion. Sans aucun mal auprès de son épouse Monique, prof de français à la retraite, qui a fondé une bibliothèque forte d'environ 400 ouvrages. Une dizaine d'adeptes se retrouvent une fois semaine pour échanger à Montferrier. Un chiffre suffisant pour que soit décernée l'étoile verte à la commune. Ce label récompense les agglomérations qui ont un esperantiste pour mille habitants.

Le couple nourrit sa passion des relations nouées lors des congrès universels avec des esperantistes du monde entier. Leur maison a vu défiler des Népalais, Hongrois ou Brésiliens. « Le couch sleeping existe depuis toujours chez les esperantistes. Cette langue rapproche les gens. » ●

De Beziero al Mongolio:

De la 6an ĝis la 29an de Junio 2010, Line, Martine, Genevieve A. kaj Genevieve G. veturadis per trajno, aviadilo, buso kaj aŭto de nia regiono ĝis la Gobia dezerto.

Ni aliĝis al la karavano en Moskovo, kie ni retrovis Evelyne kaj Nicolas. Ili ĵus alvenis de San Petersburgo kun kelkaj samideanoj. La karavano konsistis el 27 personoj. La plej multo venis el Francio. Ni rimarkis 1 usunanon, 2 nederlandanojn, 1 italianon, 2 portugalanojn kaj Marcel Delforge el Belgio.

Dum tri tagoj ni vizitis Moskovon ĉefe Kremlinon, multajn preĝejojn kaj monahejojn. Pluraj ĉiĉeronoj gvidis nin. Du komencantaj esperantistoj promenigis nin laŭ la malnovaj stratoj de la ĉefurbo.

Poste la transsiberia aventuro komenciĝis. Kelkaj el ni dormis en kvar persona kupeo, aliaj elektis plakarton (popolan vagonon), kie ili renkontis kaj babilis kun rusanoj. Iom post iom ni alkitimiĝis al la trajna vivo dum kelkaj tagoj. La trajno trairis vastegajn betulajn arbarojn, vilaĝojn kaj urbetojn. Kiam la trajno haltis, ni malsupreniris kajen por aĉeti kukojn aŭ fruktojn.

Iom post iom ni konatiĝis unu la alian, multe babilis en la kupeo, en la koridoro aŭ en la restoracio. Laŭ nia deziro ni

trinkis teon aŭ kafon dank'al la samovaro, kiu staris komence de la vagono. La vartistinoj estis afablaj kaj helpemaj. Ili multe laboris, por ke la vagano restu pura.

En Krasjonarko atendis sur la kajo multaj akceptemaj esperantistoj. Kune ni vizitis la urbon. Ĉiam unu el la klubo klarigis al ni la diversajn lokojn. Ni rimarkis belajn placojn, ĝardenojn kaj de la ponteto ni vidis Ienisseion, kiu fine de printempo inundas la bordojn de la riverego pro fonto de neĝo. Ni partopenis al la distra vespero legante poemon de Fernande Terral, kantante "La Bela Vito" kaj "Se kanto"). Poste ni aŭskultis fablon de La Fontaine, C.D. de Kajto, kantojn de Rusio kaj Akordionon antaŭ liberaj dancoj. Kia bela vespero !

En Irskutz ni denove eltraniĝis por viziti la urbon kaj ĝian riverbordon. Poste ni veturis sur teravojo al la Lago Baikalo, precize sur la plej vasta insulo. De tie ni enŝipiĝis por promeni sur la kvietaj puraj akvoj de la lago ĝis la insuleto de la stupo (budista monumento).

Ni dormis en kampara hotelo dum du noktoj.

Post la landlimo ni malkovris Mongolion. En la stacidomo de Ulanbatoro, atendis la prezidanto de la Mongolia Esperanta Asocio kun aliaj samideanoj, kiuj helpis nin trovi niajn dormlokojn.

La 6a Azia Kongreso en la plej nova hotelo Ĉinggis Khaan malfermis kun 254 partoprenantoj el 16 aziaj landoj kaj 14 el aliaj lokoj. La Japanoj estis la plej nombraj kaj multaj el ili helpis la Mongolan Asocion por la sukceso de la kongreso. La fakfakuloj estis diversaj. Ni sekvis la lecionon pri la mongola lingvo kaj malkovris ĝian malnovan skribmanieron.

Dum la distraj vesperoj ni malkovris la kulturen riĉecon de la lando : dancojn, kantojn, sportojn, k.t.p.

La ĉefurbo rapide kreskiĝas; la aŭtoj estas pli kaj pli nombraj. La stratoj estas movoplenaj. Ni devis esti tre atentemaj, kiam ni trairis la straton en nur 20 sekundoj. La stiristoj hupas kaj la aŭto daŭrigas sian vojon.

Sur la trotuaro en pluraj budoj ni povis aĉeti fruktojn, legomojn aŭ bonbonojn. Facile ni elektis popolajn restoraciojn, en kiuj ni manĝis ŝafan supon kun legomoj kaj trinkis teon kun salata lakto.

Post la kongreso père de agentejo ni vizitis Gobian regionon. En 4/4 rusa aŭto kun sperta stiristo sur teroj ni kvar malkovris la dezertan parton kaj la duondezertan parton de Gobi. La franĉparolanta ĉiĉerono klarigis la

Restado de Dominique en Langvedoko-Rusiljono

De la 15a ĝis la 25a de aprilo 2010, mi gastigis mian amikon Dominique, el Brazilo. Li estas juna, vigla, interesa kaj nuntempe studas (doktoro) pri historio de Sankta Patriko en Irlando. Mi invitis lin por riĉigi mian renkontiĝon okaze de la vizito de la Malnova Tombejo. Dank'al la helpo de multaj federacioj, li vizitis multajn diversajn lokojn de nia regiono : Beziero, pluraj opidumoj, Sommières, Pézenas, Servian, la Midi-Kanalo, Seto, Montpellier, Nimo... Li spektis tre bonan koncerton dum la

diversecon de la pejzaĝo: dunojn, oazojn, herbejojn, stepojn, ruĝajn kaj rozkolorajn montojn. La kvin muzeloj (kameloj, ĉevaloj, bovinoj, ŝafoj kaj kaprinoj) trankvile paŝtiĝas kune. Ni vidis sanktan monton, malnovajn monaĥejojn. Apud la salata lago la brutaro trinkis kaj la ĉevalpaŝtisto kondukis ĝin al alia herbejo.

Ni dormis en geroj en turistaj kampadejoj. La vetero varmis, varmegis la tutan restadon kaj ni trinkis multe da akvo kaj koka-kolaon.

Kvankam la vojaĝo estis iomete laca ni multe ŝatis tiun mitan kaj mirindan landon. Ekde nia alveno en Bezieron ni memorigas en nia kapo kaj per fotoj nian superban vojaĝon.

Subskribas :C.B.E.

M. n'a pas manqué de prendre des photos et de les mettre en ligne sur son blog (lien ; <http://www.ipernity.com/home/146141?rev=31>): paysages, monuments, faune (chevaux, chameaux, chèvres, iguane...), flore, activités humaines... voir le blog : [cessenon centerblog](#)

'Bobby Lapointe'-festivalo kaj gustumis multajn diversajn francajn specialaĵojn. Li malkovris la diversecon de niaj francaj fromaĝoj kaj de nia regiono.

Li jam vizitis la du plej konatajn francajn regionojn : Parizo kaj Bretonio. Tamen li deklaris ke la plej bela kaj interesa regiono kiun li vizitis ĝis nun estas la nia !!! Li tre ĝojis renkonti la afablajn esperantistojn de nia regiono, kaj reciproke ! Tre bona sperto por ĉiuj kiuj renkontis lin.

Veronique Bichon

Vizitado de Dominiko en Nemozo

Dominiko, juna brazilana studento, estis la gasto de la grupo de Beziers.

Dum lia restado, li decidis viziti Nemozon.

Tri anoj el la nemoza klubo gvidis lin tra la urbo, kaj donis al li klarigojn pri la diversaj romianaj monumentoj. Estis longa tago: ni vidis la arenojn (ni havas nur unu!), la katedralon (kiu ne estas la plej granda kirko de nimo), la augustan pordon, la kvadratan domon (kiu estas nek kvadrata nek domo!), la dianan templon (kiu ne estas templo!), la grandegan turon (kiu ne estas grandega!) kaj la fontanan ĝardenon (kiu ne havas fontanon!).

En la restoracio ni manĝis kanguruon (kiu tute ne estas nemoza specialaĵo!).

La vetero estis bela, bona etoso regis dum la tuta tago kun tre afabla vizitinto.

Dankon al li por lia alveno.



Datoj	Lokoj	Horoj	Temoj
04-09-10	M.V.A.	14H30	Preparado budo
11-09-10	ALLEES	09H30 à 18H	Allées des Assoc.
25-09-10	M.V.A.	14H30	Novlernantoj
09-10-10	M.V.A.	14H30	Kunveno
16-10-10	SETE-Lazaret	09H30 à 18H	Federacia Kunveno
13-11-10	M.V.A.	14H30	Preparado Z.Tago
04-12-10	M.V.A.	10H à 17H	ZAMENHOFA tago
08-01-11	M.V.A.	14H30	Preparado A.G. kuko
12-02-11	M.V.A.	14H30	Generala Kunveno
26-03-11	M.V.A.	14H30	Printempa Kunveno
22-23-26-05-11	SETO		IREM
21-05-11	M.V.A.	14H30	Kunveno
25-06-11	???	???	Pikniko

ADRESO : Cercle Biterrois d'Esperanto, Boîte n° 41
Maison de la Vie Associative 15, rue du General
Margueritte 34500 BEZIERS

COURRIEL : esperanto.beziers@hotmail.fr

Servoj

Esperantistoj prave fieras pri kelkaj atingaĵoj de la movado, ekzemple pri PS (Pasporta Servo - senpaga gastigado je 1450 adresoj de 91 landoj). Tiu servo ebligas praktiki esperanton hejme kun eksterlandanoj aŭ profiti eksterlande la konatiĝon kun lokaj esperanto-parolantoj (ĉiu gastiganto difinas la kondiĉojn de akcepto, la daŭron de la akcepto, la nombron da gastoj...).

Alia fieraĵo kaj argumento estas la jarlibro de la delegitoj de UEA, kontakteblaj en centoj da landoj. En 2009 estis 1735 delegitoj en 102 landoj, inter kiuj 110 en Francio. Ĉijare estas 1679 en 101 landoj (105 en Francio). Do sentebla malkresketo. En la lastaj jaroj malaperis en nia regiono delegitoj en Perpignan, Béziers, Montpellier (restas nur du en la federacio, unu en Aude kaj unu en Lozère). Delegitoj utilas por informi kaj akcepti eksterlandanojn. Estas domaĝe konstati la malfortiĝon de la servo, iom post iom. Por esti kandidato, sufiĉas esti membro de UEA de tri jaroj. La ĉefdelegito por Francio estas Renée Triolle (La Ciotat 13).

Esperanto estas ĉies afero !

J.H.

Tomasz Chmielnik el Pollando bezonas vian tre spertan helpon por traduki el la franca al Esperanto la plej gravajn verkojn de Edmond Privat. Tiucele li invitas franclingvanojn veni al siaj tradukaj atelieroj dum 3 someraj semajnoj en la kastelo Grezjilono inter la 17a de julio kaj 7a de aŭgusto. Post kelkaj jaroj aperu la verkaro de Privat libroforme. Klaku tien por legi pri tiu granda tasko <<http://gresillon.org/spip.php?article47>>.

Por sukcesigi tiun gravan laboron, mi persone ofertas al novaj aliĝantoj reduktion de 20 € por la ĉioinkluziva tarifo, se vi nun rete aliĝas. Klaku tien por liĝi <<http://gresillon.org/spip.php?rubrique19>>. Salutas Bert SCHUMANN por <http://gresillon.org>

AKADEMIO DE ESPERANTO

Elektio de triono de la akademianoj Oficialaj informoj, numero 13-2010-04-29 Okazis en la unuaj monatoj de ĉi tiu jaro la reelektio de triono de la akademianoj laŭ la Statuto de la Akademio de Esperanto. <http://www.akademio-de-esperanto.org/>

Ne rekandidatis Aŝvinikumar, Gersi Alfredo Bays, André Cherpillod, Flavio Rebelo kaj Trevor Steele. Iliajn lokojn prenis la novaj akademianoj Marcos Cramer, Lena Karpunina, Stano Marček, Paŭlo Moĵajev kaj Alexander Schlafer.

Estis reelektitaj Vilmos Benczik, Probal Dasgupta, Miguel Gutierrez Aduriz, Boris Kolker, Erich-Dieter Krause, Li Shijun, Carlo Minnaja, Humphrey Tonkin, Bertilo Wennergren, Yamasaki Seikō. Pro la ĵus okazinta forpaso de akademiano Maŭro La Torre, nun la Akademio konsistas el 44 membroj: Perla Ari Martinelli, Marc Bavant, Vilmos Benczik, Gerrit Berveling, Marjorie Boulton, Renato Corsetti, Marcos Cramer, Dao Anh Kha, Probal Dasgupta, Michel Duc Goninaz, Lena Karpunina, Gbeglo Koffi, Paul Gubbins, Miguel Gutierrez Aduriz, Otto Haszpra, Christer Kiselman, Boris Kolker, Ilona Koutny, Katalin Kovats, Erich-Dieter Krause, Li Shijun, Jouko Lindstedt, François Lo Jacomo, Anna Lowenstein, Ma Young-tae, Carmel Mallia, Stano Marček, Geraldo Mattos Gomes dos Santos, Carlo Minnaja, Paŭlo Moĵajev, Brian Moon, Barbara Pietrzak, Sergio Pokrovskij, Otto Prytz, Baldur Ragnarsson, Francisko Simonnet, Alexander Shlafe, Saka Tadas, Humphrey Tonkin, Amri Wandel, John Wells, Bertilo Wennergren, Xie Jü-ming, Yamasaki Seikō,

La estraro de la Akademio de Esperanto laŭ [ade-oficialaj-informoj]

AdE

Miaj spertoj pri publikaj transportiloj Arie Bouman

Kiam mi kaj mia edzino decidis partopreni al la kongreso REK 26 (Rusia Esperanto-Kongreso) en Sankt Peterburgo kaj postkongreso en Moskvo (majo/junio 2010), ni devis demandi la vizon por eniri en Ruslando.

Ni loĝas jam de kelkaj jaroj en Portiragnes (34), suda parto de Francio kaj demandis al nia amiko Jean Hénin, kia maniere ni povus akiri la vizon. Li kiel organizanto de internaciaj vojaĝoj ankaŭ por esperantistoj, povus bone informi min.

Li rekomendis agentejon en Parizo kiu intervenos por akiri tion ĉe la konsulejo de Ruslando.

Kiel de origine nederlandlingvano, mi informis min ankaŭ en Bruselo (B) kie oni informis min eĉ en mia propra lingvo.

Pro tio mi decidis peti la vizon en Belgio, ankaŭ forflugi ek de tie, ĉar Parizo (malgraŭ ke ĉiu vojo en Francio kondukas al Parizo) situas preskaŭ 800 km de Portiragnes. Ni veturis al Belgio al nia libertempoloko sufiĉe frue por persone peti tiun vizon; sufiĉe komplika afero: ne nur formularon, ankaŭ pasfoton, invitleteron de organizantoj, specialan asekuron nur por Ruslando ni bezonis.

En Belgio mi havas la avantaĝon kiel +65jarulo uzi la trajnon malmultkosta kaj kun abono eĉ senpage la busojn, tramojn kaj metroojn.

La Rusa Konsulejo en Bruselo estas nur malfermita 3 tagoj en la semajno de la 9.30a ĝis la 12.30a horo kaj troviĝas proksimume nur 140 km de mia loĝejo en Knokke-Heist (marborde de Belgio).

Laŭ retaj informoj estos por akiri Rusan vizon ĉe konsulejo en Bruselo, longa viĉo ekstere kaj oni fermos la enirejon strikte je la 12.30a horo!

Kiel kutime propraŭtoveturanto, mi volus testi nun la publikajn transportilojn.

Mi ne volis riski alveni tro malfrue, do foriris en Knokke-Heist je la 6.30a horo; certe tro frue mi alvenis al la stacidomo de Kn-H. Post 1h45min. mi alvenis en Norda stacidomo de Bruselo, mi devis ŝanĝi de trajno sur alia kajo al Schumanstacidomo.

Por esti certe ke mi ne alvenas sur la bona kajo, mi malsupreniris kaj rigardis sur paneloj por trovi la bonan kajon, tuj mi denove supreniris la stuparon kaj rimarkas la vagonaron kun fermitaj pordoj! Laŭ iu trajnoficisto mi estis tro malfrue, ili ĵus fermis la pordojn! Verŝajne la trajno de

KN-H malfruiĝis kelkajn minutojn! Mi demandis al la trajnoficisto la horaron de venonta trajno: "je la 9.58a h."

Por pasigi la tempon de 25 minutoj, mi malsupreniris por rigardi la panelojn en la koridoro por vidi la reirhoraron kaj 5 min antaŭ la indikita tempo mi estis denove sur la kajo.

Hoho! Nun iu trajno jam forlasis la kajon! Estis la mia kiu ne forveturis je la 9.58a, sed je la 9.52a! Denove atendi 15 min.

Nun mi sukcesis kaj eliris la trajnon kaj atingis la kajon de metroo (post malsupreniro kaj denove supreniro de stuparoj). Mi atingis la Schumanrondaplacon kaj serĉis la aŭtobushaltejon de linio 60.

Tiu placo estas ege granda kaj impona ĉar ĉirkaŭe troviĝas la Eŭropaj instancoj.

Pere de linio 60 mi povos atingi mian celon, post la haltejo de E. Cavellhospitalo.

Facile mi trovis sidlokon proksime de la ŝoforo, la vojaĝo daŭras minimume 30 minutojn.

Do strange, post la unua haltejo la ŝoforo haltigis la motoron kaj forlasis la sidlokon!

"Ĉi tie estas la fino, vi devas forlasi la aŭtobuson", li klarigis. Mi klopodis malfermi la pordon, kaj ne sukcesis, mi puŝis sur butonoj sur la pordo, ne helpis, eĉ mi tuŝis la alarmbutonon!

Ankaŭ la ŝoforo ne tuj sukcesis, nur post longa manipulado de la butonoj.

Por alveni ĉe la hospitalo, mi devus preni la buslinion 60 al alia haltejo kaj en alia direkto!

Denove atendi 15 min.

Kiam ni komencis veturi, mi konstatis ke ne ĉiu haltejo indikas sian nomon, pro tio mi petis la ŝoforon anonci min kiam ni atingos la haltejon de Cavellhospitalo. Volonte li volis fari.

La haltejo Brunardstraat li mem ne konis, do mi scias pere de telefonalkvoko de mia amiko Paŭlo Branco, ke mi devus forlasi la aŭtobuson du haltejojn post la hospitalo.

Trankvile mi sidiĝis sur la unua sidloko, bone videbla de la ŝoforo.

Post certa tempo mi rimarkis ke la strato jam havas la nomon de E.Cavell, kaj poste ne plu, verŝajne mi baldaŭ atingos la hospitalon.

Kiam mi rimarkis ke la aspekto de stratoj ŝanĝiĝis al eksterurbaj, mi demandis al la ŝoforo ĉu estas ankoraŭ longa distanco por atingi la hospitalon,ŝokita li

pardonpetis, ĉar li tute forgesis min averti! Ni jam estis kvar haltejoj tro for!

Alia flanke de la strato, mi denove devis preni la buson en la alia direkto, ĝi ĵus foriris. Denove atendi 15 min.

Mi nun ne plu volis perdi tempon (mi memoras la averton ke ĉiam estas longa vico ĉe la konsulejo de Rusio kaj ili certe fermos je la 12.30a horo.

Kiam mi rimarkis ke la buso nun havas ŝoforinon, mi estis preskaŭ certa ke ŝi estos pli akurata.

Tuj mi demandis ŝin averti min kiam ni atingos haltejon Brunardstraat. ...ve! Ve! Ve!... Ŝi tute ne konas tion haltejon! Nur kiam ŝi alvenos al Brunardstr, ŝi povos vidi la nomon sur sia ekrano flanken.

Felice, ne gravas, kelkaj kunvojaĝantinoj entuziasme informis min (eĉ en la nederlanda lingvo) ke ni tre baldaŭ alvenos tie kaj ili eĉ scias ke ĉitie estas la Konsulejo de Rusio.

Baldaŭ iu virino diris: "Nun eliru, venu kun mi", ni transpiediris la straton kaj ŝi, por esti certa, demandis al loĝanto: ĉu mi povus en tiu direkto de la strato, trovi la konsulejon?

"Jes, iom pli for, sekvu la longan muron de tiu granda lernejo, kaj iom poste maldekstren"

Kun grandaj, hastaj paŝoj mi atingis la maldekstran straton kaj tuj rimarkis ke mi nun eĉ unu halto tro frue forlasis la aŭtobuson!

Finfine mi povis plilongigi la vicon ekstere de la konsulejo. Iu rimarkigis ke tiamaniere ni povas alkitimiĝi al Rusaj cirkonstancoj kaj Siberia malvarmeco.

Interne mi devis ankaŭ atendi, ĉar antaŭ mi aliaj personoj de agentejoj prezentis dekojn da demandformularoj kaj ricevis dekojn da vizoj.

Je la 12.00a h. mi estis ekstere kaj povis post 10 tagoj reveni por akcepti la vizojn.

La reveturado okazis multe pli rapide! kaj post 10 tagoj eĉ pli rapide.

Konkludoj:

Laŭ mia scio Bruselo estas la plej dulingva regiono, mi rimarkis ke la stratnomoj kaj busfinhaltejoj estas dulingvaj

(nederlanda kaj franca). Ankaŭ mi ne rimarkis barilojn dum mia busvojaĝo kiu indikas la lingvoparton.

- Malgraŭ tio mi konstatas kiam mi faris demandoj, unue en la nederlanda, 90% ne komprenas min, mi devis traduki al la Franca lingvo. **Ĉu ili tute ne kapablas aŭ volas kompreni?** Eĉ iu junulino respondis en la angla!

- Al kutimoj de publikaj transportiloj oni devas alkitimiĝi!

- Nur post pluraj provoj oni sukcesas trovi la plej rapidan solvon.

Kelkaj semajnoj poste mi denove faris la saman vojaĝon por viziti la 'Malfermitaj Pordoj'-n de la Eŭropaj instancoj, denove pli rapide pere de parta uzo de la metroo.

- Bedaŭrinde jam je la 20.30a h. ni devis forlasi niajn geamikojn ĉitie por trafi la lastan trajnon al marbordo (nur 140 km).

La plej favoraj argumentoj por uzi la publikajn transportilojn en Belgio ŝajnas al mi:

la kostoj: por +65-jaruloj la abono por busoj, tramoj, metrooj estas senpaga (?! ĉu vere ekzistas?).

trajnveturo kaj reveturo po 5.20 € (kondice ke oni nur post la 9a horo forveturos dum semajne).

la trankvileco (se oni ne strikas, malfruiĝas, korekte informas,).

Arie Bouman Portiragnes (34) Fr/ Knokke-Heist B

Klarigoj pri Belgio:

Belgio havas 3 oficialajn lingvojn: la nederlanda, franca kaj germana. Norde troviĝas Flandrio (nederlanda lingvo), sude Valonio (franca lingvo), oriente la germana lingvoparto.

Bruselo estas parte nederlandlingva, kaj parte francalingva.

Laŭ oficiala decido estas (**ne fizikaj!**) lingvobarioloj, en kelkaj interkonsentitaj urboj la loĝantaro havas la eblecon elekti la alian lingvon.

Antaŭ nelonge estis televidelsendo kun novaĵo kiu vekis grandan konsterniĝon!: Belgio ne plu ekzistas!!!!!! Oni vidis verajn barilojn kiuj dividis Belgion en flandra kaj valona parto.

Flandra politika partio aranĝis tion por substreki sian volon.

Malfacile estas klarigi la tutan lingvokverelon, grandparte ĝi devenas de malrespekto al lingvoidenteco de la alia.

Oni devus eble trovi (kaj akcepti!!!) neŭtralan lingvon!

K. L.

Semaine d'exposition du lundi 26 au vendredi 30 juillet 2010 **de 8h30 à 12 h et de 14 h à 17 h 30**
Débat public jeudi 29 de 17 h. à 19 h.

Espéranto La langue internationale équitable www.esperanto.net

Salle du Conseil municipal Mairie de Sainte ÉNIMIE

Entrée gratuite

La LOKO kunvenis (13/06/2010 en « Lazaret »)



INTERASOCIA RENKONTIĜO de ESPERANTO ĉe MEDITERANEO



SÈTE 22a ĝis 26a de aprilo 2011

« Le Lazaret » - La Corniche - 34200 SETE - FRANCIO



66-a KONGRESO de SAT-AMIKARO
 NACIA INTERASOCIA KONGRESO de ESPERANTO-FRANCE
 62-a KONGRESO de la FRANCAJ ESPERANTAJ FERVOJISTOJ

Po unu aliĝilo plenigota de ĉiu partoprenonto.

PERSONAJ INDIKOJ

familia nomo : Persona nomo :Aĝo :

adreso :

.....

retadreso :telefonnumeroj:

Mi estas kotizanta membro de unu aŭ pluraj asocioj partoprenantaj al la organizo kaj ĉi-sube precizigitaj :

- | | | |
|-------------------------------------------|---------------------------------------------------------|--------------------------------------|
| <input type="checkbox"/> Espéranto-France | <input type="checkbox"/> Federacio Langvedoko-Rusiljono | <input type="checkbox"/> SAT-Amikaro |
| <input type="checkbox"/> G.E.E. | <input type="checkbox"/> Fervojistoj | <input type="checkbox"/> F.K.E.A. |
| <input type="checkbox"/> FET | <input type="checkbox"/> Alia : | |

Bonvolu meti krucon antaŭ asocioj por kiuj vi membriĝas.

KONGRESKOTIZOJ

Kongreskotizo	ĝis 01/10/2010	ĝis 01/01/2011	Poste	Nombro	Mi pagas
Individuo	35	40	50		
Paro	60	70	80		
junuloj inter 15 kaj 30 jaroj Eksterlandanoj	10	12	15		
Infanoj malpli ol 15 jaraj	SENPAGE	SENPAGE	SENPAGE		
Po tago	20	20	20		
				SUMO 1	

KONGRESMARKOJ

	prezo	nombro	Mi pagas
Po 10 koloraj qluetikedoj (5 Esperantaj kaj 5 francaj)	1,50 €		
		SUMO 2	

SUBTENKOTIZO

Mi helpas per donaco	Mi donacas
	SUMO 3

**Entute mi pagas :
 adiciu la 3 sumojn**

EKZAMENOJ

Mi deziras trapasi ekzamenon :

Duagrada Ekzameno (Atesto pri Praktika Lernado) – 16 €

Triagrada Ekzameno (Atesto pri Supera Lernado kaj Kapableco) – 23 €

Mi ricevos informojn pri kondiĉoj kaj enskribo de la ekzamenado per la mendilo.

Mi posedas la ateston pri Kapableco. Fako :

Mi pretas helpi al ekzamenado.

LOĜEJO (Nur informcele. Tiucelan mendilon vi ricevos aparte kun la aliĝ-konfirmilo)

LOKO prizorgos loĝrezervadon:

1- En Feriejo « Lazaret » kie okazos plejparte de la kunvenoj, prelegoj kaj distra programo.
Nur eblas loĝado kun 3 manĝoj laŭ diversaj komfortniveloj.

62€ en individua ĉambro, 43€ aŭ 48€ en dulita ĉambro, 38€ aŭ 44€ en 3-4 lita ĉambro

2- En Junulargastejo en 4-lita ĉambro: 19€ kun matenmanĝo kaj littukoj. Ĝi situas en la urbocentro. Vi ne bezonos membrokarton- LOKO pagos grupokarton. Surloke ankaŭ estas kampadejo nur por tendo: 11€ kun matenmanĝo.

Proksime de la feriejo, estas diversaj mezprezaj hoteloj.

PAGMANIERO

Vi povas pagi aŭ per ĉeko al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon,
aŭ per ĝiro al poŝtkonto n° **MON : 95628 P** aldonante vian nomon

Por eksterlandanoj : per UEA-konto : felr-q
per rekta ĝiro al nia poŝtkonto

IBAN: **FR70 2004 1010 0900 95628P03 030**

BIC: **PSST FRPPMON**

Sendu vian aliĝilon kaj kotizon al :

Loka Organiza KOMitato

c/o Maria Perez Y Sanz

13bis rue Haute

FR 30310 Vergèze

Ĉiu aliĝilo validos nur post ricevo de la kompleta pago.

Aldonu afrankitan (0,90 €) koverton je la formato A5 (229mmx162mm) je via adreso por ricevi la mendilon kaj ĉiujn necesajn informojn.

Dato :

Subskribo :



IF - la tradicia novjara aranĝo por familioj kaj plenkreskuloj

27-a Internacia Festivalo en Nördlingen (Germanio)

27 dec 2010 - 3 jan 2011 (kun plilongiga ebleco ĝis 4 januaro 2011)

<http://www.internacia-festivalo.de/>

Nia adreso (organizanto): Hans-Dieter Platz
Postfach 1148 DE-34303 Niedenstein Germanio

Telefono kaj fakso: int: +49 5624 8007 (Germanio: 05624 8007)



IF - Internacia Festivalo ofertas al vi specifan programon por plenkreskuloj kaj familioj (kun aŭ sen infanoj). IF okazas sub profesinivela gvido kaj kunvenigas ĉiujare 140 - 180 personojn el proksimume 20 landoj.

IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj, kono de Esperanto kaj ĝia uzo estas gravaj, sed laŭdezire ni ofertas porkomencantajn kaj / aŭ paroligajn kursojn, ekzemple por via partnero.

Ni proponas varian programon, t.e. matene kaj posttagmeze altnivelaj prelegoj pri la kadra kaj aliaj temoj (ofte en 3 paralelaj ofertoj), kursoj, promenoj kaj tuttaga ekskurso; vespere koncerto, magio kaj danco, silvestraj balo / -bufedo kaj internacia vespero (vd. detalojn en la pasintjara programo, elŝutebla ĉi-malsupre).

Nia programo komenciĝas la 27-an de decembro per la interkona vespermanĝo, programfino la 3-an de januaro post matenmanĝo. La plilongiga tago finiĝas la 4-an de januaro, same post matenmanĝo.

Laŭdezire paralela (dumtaga) programo por infanoj sub gvido de kunlaborantoj. Infanoj laŭeble havu E-lingvajn konojn. Subtrijarul(-in)oj estas senkotizaj, sed gepatroj mem okupiĝas pri ili (manĝo kaj prizorgo). Laŭdezire disponeblas infanaj litetoj en limigita kvanto.

Ankaŭ ĉi-jare nia *Knajpo* - la fama trinkejo en Esperantujo - bonvenigas vin, ĝuu ĝin denove ĉe biero, vino kaj koktelo, en etosoplana rondo, inter viaj novaj kaj malnovaj geamikoj ...

Nördlingen estas konata bavara urbeto (110 km oriente de Stuttgart), fama pro sia mezepoka origino kun komplete konservita urbo-murego; vd. paĝon urbo. La klerigejo ofertas saŭnon, trinkejon kaj luksajn ĉambrojn (ĉiuj kun duŝo kaj necesejo), ofte kun balkono kaj TV; vd. paĝon domo. Laŭdezire transporta servo de / al la (proksima) stacidomo.

Katalin Kovats Novaj rekordoj dum la 12a KER-ekzamensio

La 5-6an de julio 2010 en Slovakio kaj Usono paralele okazis la 12a sesio de la novaj KER-ekzamenoj. La aranĝoj SES (Somera Esperanto-Studado) en Piešťany (Slovakio), renkontiĝo de lernu-anoj kaj NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto) en la universitato de San-Diego (Usono) gastigis la 12an sesion de la nova ekzamensistemo.

Danke al la zorga kaj aktiva antaŭpreparo kaj la multnombra partoprenantaro de la eŭropunia Grundtvig-projekto, dum la ĝemelsio la ekzamenojn trapasis entute 48 personoj, je unu pli ol en la sesio dum la UK en Bjalistoko. Sume la 12an sesion trapasis 48 personoj el 13 landoj kaj per tio ni havas nun entute 186 trapasintojn el 31 landoj de la mondo.

Ŝanĝiĝis la rekordlisto kaj Pollando transprenis la unuan lokon kun 28 kandidatoj. Gratulojn al niaj polaj samideanoj. Zamenhof fierus pri ili. Pollandon sekvas Germanio kun 26 kaj Francio kun 25. Estas ne tute reale esperi, ke dum la proksimaj 13a ekzamensio, okazigota dum UK en Kubo aŭ la 14a en Lignano, dum la Itala Kongreso, ni sukcesos superi la ĝisnunan rekordon, sed ni restas esperplenaj.

edukado.net edukado.net edukado.net edukado.net



Ĉu ...?

Trapasu la KER-ekzamenojn de UEA-ITK

Institucio

La novaj ekzamenoj nun estas ellaboritaj en **niveloj B1 (komencintoj), B2 (mezniveluloj) kaj C1 (progresantoj)**. Mem la atestilo estas impona, oficiala dokumento, verkita en 4 lingvoj (en Esperanto, angla, germana kaj franca).

La akreditigo kaj funkciigo de la sistemo okazas kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la oficiale rekonataj fremdaj lingvoj.

Nia hungara partnero ITK estas plenrajta membro de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo **ALTE**.

Informoj

Detalajn informojn kaj [aliĉformularojn](#) vi povas elŝuti en la paĝaro www.edukado.net, sekcio 'Novaj UEA-ekzamenoj'.

En la sekcio **PRISKRIBOJ** vi povas legi la detalan prezenton pri la postuloj kaj strukturo de la ekzameno.

Vi certe rimarkos, ke kompare kun la malnova ILEI-UEA-ekzamenoj en la KER-ekzameno nur en la parola parto estas kelkaj demandoj traktantaj la movadajn kaj kulturajn konojn pri Esperanto, la skriba parto ne entenas tiajn taskojn.

Por interesuloj ni aparte konsilas mendi ĉe UEA la eldonaĵon *Esperanto de nivelo al nivelo*, kiu entenas ĉiujn necesajn informojn kaj seriojn de specimenoj je ĉiu nivelo de la ekzamen sistemo.



Prezoj

Bazaj prezoj:

66(B1)-72(B2)-82(C1) eŭroj

Por landoj: Aŭstrio, Belgio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Greklando, Hispanio, Irlando, Islando, Italio, Japanio, Kanado, Luksemburgo, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Svedio, Svislando kaj Unuiĝinta Reĝlando.

A-landoj: 44(B1)-48(B2)-54(C1) eŭroj

Ĉeĥio, Danio, Honkongo, Hungario, Israelo, Kipro, Koreo, Respubliko, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Portugalio, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Sud-Afriko kaj Tajvano.

B-landoj:

34(B1)-38(B2)-42(C1) eŭroj

Brazilo kaj Rusio kaj Ĉiuj aliaj ne listigitaj landoj.

Sesioj

Por la sekvaj monatoj ni planas plurajn sesiojn.

En 2010:

dum **PSI** en Germanio,

UK en Kubo, **SES** en Slovakio,

dum **NASK** en San Diego,

dum la **Itala Kongreso** en Linjano,

en oktobro en **Indonezio** kaj en Herzberg

dum **TORPEDO**.

Aliaj sesioj estas ankoraŭ planataj.

Organizantoj de grandaj eventoj kaj renkontiĝoj, interesataj kunokazigi sesiojn, kontaktu Katalin Kováts.



En 2009 126 esperantistoj el 31 landoj superis la ekzamenon kaj akiris sian diplomon.

Se ankaŭ vi volas trapasi la novajn KER-ekzamenojn, petu informojn pri la sekvaj sesioj ĉe **UEA** aŭ rekte de Katalin Kováts, je la adreso redaktanto@edukado.net



Stage linguistique d'ESPERANTO Toulouse du 6 au 10 Septembre 2010

FICHE D'INSCRIPTION :

A retourner à :
Mirc André - 44 Rue de Marseillan - 31240 l'Union
Avant le 30 Juillet 2010

Je désire participer au stage :

- 1 – débutants (Komencantoj)
- 2 progresantoj
- 3 konversacio
 - Je paie 50 € pour le stage
(Pour les non cheminots 60€)
- Je suis déjà membre de l'AFCE.
- Je ne suis pas membre de l'AFCE
 - Je suis cheminot ou ayant droit : 27 €
 - Je ne suis pas cheminot : 32 €

Contact :

andmir@wanadoo.fr

<http://perso.orange.fr/TEF-ESPERANTO/>

Tel : 0562899296

Ou : 0561179316

Nom-Prénom : _____

Adresse : _____

Ville : _____

CP : _____

Tel : _____

Courriel : _____

N° de CP (si cheminot) : _____

Je joins un chèque de : _____ €

- Je viens en voiture

- Je viens en train - Jour et Heure d'arrivée : _____

Le : ___ / ___ / 2010

Signature :

***Possibilité d'hébergement, nous contacter.**

Possibilité de prolonger cette semaine par un WE en montagne, en gîte SNCF. (Arreau, Boo-Silhem ou Porté-Puymorens)

Programme : Petite rando, jeux, détente

Je participerai au WE du 11 et 12 Septembre 2010 : Oui. Non

J'ai conscience que je dois avoir une assurance accident

NB : Si le nombre de participants est insuffisant, le stage et (ou) le WE à la montagne seront annulés et les sommes versées restituées dans leur intégralité.

PRI SETE kaj ĜIA KUIRARTO

LA MACARONADE :

Dimanĉe, kiam la vetero belas, ĉiu loĝanto de Sete iras al la « baraquette » manĝi specialan pladon : la « macaronade ». La « baraquette » estas simpla dometo. La unuaj « baraquette » konsistas el 4 fostoj, ferlada tegmento kaj muroj el kanoj. Estas ŝirmejo por la ĉevalo, la familio, la vinberrikoltantoj kaj la ĉasistoj. Nun ni nur povas vidi tiujn ŝtonajn dometojn meze de la vitoj (Listel aŭ Picpoul de Pinet). Kiam eblas la familio kaj la amikoj travivas la tutan dimanĉon. Tie ili eltiras el la korbo la ingredientojn al la preparado de la plado.

Ingredientoj por 4 personoj :

- Bova poplitaĵo (500g) ; 1 porka kotleto aŭ kolbaso ; 4 maldike viandaj tranĉetoj.
- Makaronioj (500g) ; -fromaĝo (parmezano).
- Ladtomatoj 4/4 kaj malgranda skatolo de densigita tomato.
- Ajlo – cebo – petroselo – salo – pipro.

RECEPTO :

Unue ni hakas cebon kaj viandon. La hakitan viandon ni metas sur la maldikan tranĉeton kaj ni kunligas per ŝnuretoj. Ni obtenas rulitajn kaj farĉitajn viandaĵojn, kiujn ni kuiras en oleita marmito kun cebo kaj ajlo. Ni aldonas la 2 skatolojn pri tomatoj.

En bolantan akvon ni ĵetas la makaroniojn.

La kuirado finita, ni bele prezentas la pladon : unue plado por la viandaĵo ; due plado por la makaronioj ; bovlo por la raspita fromaĝo kaj bovlo por la saŭco.

BONAN APETITON

KRIZOFRISO kun ANETO:

Kiam estas la sezono de la traĭro de la krizofrisoj inter la lago Thaŭ kaj la maro, multegaj fiŝkaptistoj elligigas tre frue por havi la plej bonajn sitlokojn sur la kanalan kajon en la kvartalo « La Pointe Courte » kaj instalas plurajn fiŝkanojn. Hejme ili kuiras la krizofrisojn.

Ingredientoj por 6 personoj :

- Unu krizofriso (1,5kg) ; butero (50g) ; 2 laktumoj de freŝa haringo ; olivoleo(1dl) ;
- Bukedeto de Aneto aŭ kelkaj gutoj de anisbrando ; 1 ovoflavo ; petroselo, ajlo, cerefolio ; blanka seka vino.

RECEPTO :

SETAJ TERPOMOJ :

Ingredientoj por 4 personoj :

- Terpomoj(1kg) ; 2 ajleroj ; 3 kuleroj da olivoleo ; petroselo, salo, pipro.
- Majonezo : 2 kuleretoj da vinagro ; 1 ovoflavo ; salo, pipro ; oleo.

RECEPTO :

Unue ni senŝeligas kaj pecigas la terpomojn kaj la ajlerojn. Ni hakas la ajlerojn kun la petroselo. En oleita varma marmito ni antaŭkuire subrostar la

LA SETA « TIELLE » :

Ingredientoj por 6 personoj :

- Malgrandaj polpoj (1kg)- Blanka seka vino.
- Rompiĝema pasto : faruno(50g) ; gista paketo ; salo ; 4 kulerplenoj da oleo ; 1,5 glaso da varmota akvo. (ni povas aĉeti la paston).
- Saŭco:4 tomatoj ; 1 dika cepo ; 2 ejleroj ; 2 malgrandaj paprikofruktoj ; oleo, salo , pipro kaj petroselo.

RECEPTO:

Ni preparas la rompiĝeman paston ,ni faras pilkon kaj ni envolvas ĝin en tukon dum 2 horoj.

Ni purigas la polpojn kaj kuiras ilin dum 30 minutoj en salata akvo kun glaso da vino. Ni senhaŭtigas la kuiritajn polpojn per fingroj kaj ni pecigas ilin per tondilo.

En oleita pato ni antaŭkuire subrostar la hakitan cepon . Ni aldonas ajlon , hakitan petroselon kaj pecojn da polpoj kaj ni dolĉe antaŭkuire subrostar la tuton.

Poste ni aldonas tranĉitajn tomatojn kaj la pistitajn paprikofruktojn. Dolĉe ni kuiras ĝis havi bongustan saŭcon.

Ankaŭ ni povas anstataŭi la viandaĵon per marfruktojn.

Ĉiujare en Sete , konkurso kuniĝas la plej spertaj famaj gekuiristoj pri tiu plado kaj juĝantaro elektas la plej bongusta « macaronade ». Kaj ĉiuj kune gustumas.

Unue ni lavas la krizofrison, eltiras la intestojn per la operkuloj. Tiel la ventro restas bonstata.

Delikate ni hakas la aneton (aŭ kelkajn gutojn ni aldonas) kun petroselo cerefolio kaj ajlo. Ni pistas la tuton kun la laktumoj de haringo, la butero kaj la ovoflavo.

Delikate ni metas tiun farĉon en la korpon de la krizofriso per operkuloj. En oleita plado ni metas la fiŝon kaj aldonas salon kaj pipron. Ni ne forgesas fendi la dorson sur la ĉefa fiŝosto per tranĉilo. Ni priverŝas olivoleon sur la fiŝon kaj ni enforigas (th7°) dum 15-20 minutoj.

Dum la kuirado ni abunde priverŝas per olea kulerpleno.

Ni prezentas la krizofrison en ĝia kuirplado sur la tablo. 5 minutojn antaŭ la manĝo ni aldonas kelkaj kuleroj da blanka seka vino.

terpomojn. Ni aldonas la hakaĵon kaj miksas. Ni dolĉe kuiras dum 20 minutoj.

Ni aldonas salon, pipron kaj bolantan akvon ĝis la mezo de la marmito. Ni kovras kaj kuiras dum 25 minutoj.

Nun, ni preparas la majonezon sen mustardo. Poste ni verŝas kaj miksas la restaĵon de la bolanta akvo en la majonezon.

Ni eltiras la marmiton el la fajro kaj miksas la terpomojn kun la majonezo.

Ni tuj manĝos kun ruĝa aŭ rozkolora vino.

En buterita muldilo ni disigas la paston, ni verŝas la saŭcon kaj ni kovras per tavolo pasto.

Por beligi la « tielle » ni pikas per forko ĝian rondformon.

Ni verŝas iomete da oleo sur ĝin kaj ni enforigas ĝin dum 30 minutoj (th7°).

Ni varme manĝas kun blanka seka vino.

LA POLPOJ : Ili estas moluskoj, kiujn la setaj loĝantoj nun manĝas sub individua rondforma kuko nomata « tielle ». Tiu plado devenas el Italio. Estas la plado de la mizeruloj. Kiam la fiŝkaptisto vendis sian produkton, li konservas por si kaj sia familio la malgrandajn polpojn. Li kuiras kun ili raguon, kiun li metis en torton. Ankoraŭ nuntempe la plado malmulte kostas. Sur la urbadoma placo staras statuo nomata polpo.

Tiujn receptojn ni trovis en libro « Richesses et saveurs de l'Hérault » fare de grupo da kamparaj virinoj sub la nomo « Maguelonne ». C.B.E. tradukis kelkajn el ili.

Sudfranca kanalo

Canal du Midi

La 'sudfranca kanalo' aŭ la 'Kanalo de la du Maroj' estas franca kanalo, kiu kunligas Garonne (Garon) kun Méditerranée (Mediteraneo). Pere de ĝi kaj de la flankkanalo ĉe Garonne oni povis navigi de Atlantique ĝis Méditerranée. Ĝi estas plilongigita per la kanalo de Rhône (Rono) ĝis Sète (Seto).

Ĉar ĝi unue estis nomita Reĝa kanalo en Languedoc (Langedoc) la revoluciuloj ŝanĝis ĝian nomon n' 'Sudfranca kanalo', en 1789. Ĝiaj samtempuloj rigardis ĝin kiel la plej grandan konstruaĵon de la dektria jarcento.

Striksence la 'Sudfranca kanalo' indikas la komence efektivigitan parton, Toulouse ĝis Bordeaux (Tuluzo ĝis Bordo), de la projekto pri kanalo de la du Maroj), ensemblo de navigeblaj vojoj, kiuj permesis kunigi Méditerranée kun Atlantique :

- La 'Sudfranca kanalo' kaj Garonne pli malpli navigebla inter Toulouse kaj Bordeaux,
- Poste la flankkanalo ĉe Garonne, sekve konstruita
- Kaj la estuaro de Gironde (ĵironda) apud Bordeaux.

La tritika komerco kaŭzis ĝian onstruon. Ellaborita de 1666 ĝis 1681 dum reĝado de Ludoviko la kvara kaj ankaŭ antaŭ supera kontrôlo de Paul Riquet (Petro-Paŭlo Riketo) la 'Sudfranca kanalo' estas unu el la plej malnovaj eŭropaj kanaloj daŭre funkciantaj. (la kanalo de Briare (1644) estas ĝia prototipo). La ekkonstruado de tiu laboraĵo estas strikte ligita al problemo de riverveturado en modernaj tempoj. La defio akceptita de Paul Riquet estis aldirekti akvon de la Montagne noire (la Nigra Monto) ĝis le Seuil de Naurouze 'Sojlo de Noruzo), la plej alta punkto de la vojiro.

Ekde 1996 UNESCO (organizo de unuiĝintaj nacioj por edukado sciencoj, kaj kulturo) klasis ĝin en la listo de homara hedera posedaĵo.

Lokalizado kaj profilo de la Kanalo

La Franca suda kanalo trapasas tri departamentojn Hérault (hero), Aude (od) kaj Haute Garonne (Alta Garon). Ĝi fluas 241 kilometrojn inter Marseillan (Marsejan), kie ĝi eniras en la basenon Thau (To), apud Sète kaj Tuluzo. Ĝi estas profunda ĉirkaŭ 2m kaj larĝa ĉirkaŭ 20m. Tiu kanalo posedas iun interkluzojn dividantan akvon, ĉar unu deklivo direkte iras al Atlantiko kaj alia direkte al Méditerranée.

Historio

Forlasitaj projektoj

La fosado de tiu Kanalo estas malnova revojo : Auguste, Neron, Charlemagne, François 1^{er}, Charles IX, kaj Henri IV jam sonĝis pri tio. La plej realistaj projektoj estas proponitaj al reĝo en la XVIa jarcento. Tiuj ĉi ne estas lanĉitaj pro timo de nemondonaj elspezoj kaj pro konvinko pri homa malebleco fosi tian kanalon.

La projekto de Paul Riquet

En 1660 Pierre Paul Riquet trovas solvon de la ĉefa problemo: elkondi akvon al divida punkto por provizi la du deklivojn de la kanalo. Tiucele li projektas kapti montarajn akvojn en kolektbaraĵojn kaj aldirekti ilin ĝis

Sojlo de Naurouze (Noruzo) per kanaletoj. Kiam la reĝo Louis XIV ekscias lian proponon en 1662 li ekvidas oportunun por senigi Hispanion je parto de ĝiaj monrimedojn kaj por stampi sian reĝadon per nepereonta arkitektura verko.

P.P.Riquet ricevis neniun teknikan edukadon. Li praktikas eksperimentadon kaj observadon de la tereno tamen lia labormaniera estas scienca. Li konstruas en sia bieno 'Bonrepos' maketon de la kanalo kun kluzoj, tuneloj, elverŝoj respektante la deklivojn kaj provizante per akvo la ensemblon.

Politika kaj ekonomika konteksto

Colbert (Kolber) antaŭvidas, ke tiu projekto favoros ekonomikan ekspansion. La kanala konstruaĵo permesos krei rektan pasejon, kiu evitos la markolon de Gibraltar (Ĵibraltar) kontrolita de hispanoj, celante ruinigon de la hispana komerco kaj starigante komercan fluegon tra Langedoko.

La produktistoj de Lauragais (Lorage) penas eksporti siajn produktojn pro manko de komercaj rimedoj; tritikon, silkon, vinon, drapojn, kaj salon. Dank'al kanalo ili estos pli facile disvenditaj en diversajn regionojn.

Financado de la projekto

En Otobro 1666 Colbert (Kolber) permesas laborkomencon pere de reĝa edikto. Li ricevas helpon de Clerville (Klervil) inĝeniero pri fortikaĵoj.

La ŝtataj financoj ne estas bonstataj do P.P.Riquet proponas parte financi laboroj per siaj propraj monrimedoj kontraŭ rajto de kanal - proprieto kaj ekspluatado.

Komence la budĝeto estis je 6 milionoj da tiamaj pundoj tamen finfine la tuto de la laboroj kostas 17-18 milionoj: 40% de tiu sumosumo antaŭpagita de la Reĝo, 40% de la provinco kaj 20% de P.P.Riquet mem.

Realigado de la kanalo

La unua parto de la laboroj komenciĝas la 1an de Januaro 1667: konstruado de la ebenaĵa kanaletoj.

-15 Aprilo 1667 metado de la unua ŝtono de la lago Saint Ferreol (sankta fereol)

-Novembro 1667 metado de la unua ŝtono de la Garona kluzo en Tuluzo do de la kanalo.

-Dum vintro 1671-1672 unua ŝip- cirkulado inter sojlo de Noruzo kaj Tuluzo

-1673 fino de la unua parto (Tuluzo-Trèbes) (Treb)

Ekde 1671 komenciĝas la dua entrepreno por interkomunikigi Trèbes kun Mediteraneo kaj por konstrui la havenon de la urbeto Sète (Cette en tiu epoko).

- Konstruado de triporda ronda kluzo en Agde, kiu ebligas eniri en riveregon Hérault kaj en la lagunon Thau..

-Konstruado de 8 sinsekvaj kluzoj en Fonséranes (Fonseran) ĝis la riverego Orb.

En 1680 P.P.Riquet forpasas kaj la reĝa inĝeniero La Feuille daŭrigas la aferon..

En 1681 fino de la kanal-laboroj en Béziers.

Oficiale la sudfranca kanalo estas malfermita al navigado la 15an de Majo 1682 kaj al trafiko en Majo 1683.

Koncurenco de fervojo

Strange, la kanalo ne vere plenumas sian taskon. La ekonomikaj kaj politikaj circonstancoj, la streĉiteco de la hispana milito (1936-1939) malebligas la esperitan ekonomikan kreskon. Post ducentjara ekspluatado; la kanalo komencas suferi pro konkurenco fare de fervoja kaj ŝosea veturado. Ĝi atingas sian apogeon meze de la XIXa jarcento.

En 1858, Napoleono la tria elirigas dekreton, kiu koncesias la kanalon por kvardek jaroj al la kompanio de la Sudfranca fervojo posedanta la linion Bordoza-Narbonne. Tiu dekreto pli grave malaltigas la cirkuladon de barĝoj sur la kanalo. Fakte, la kompanio favoras la fervojon pli taksante la kanalan komercan veturadon. La Sudfranca kanalo fariĝas la rivera vojo la plej multekosta en Francio. Krom, fervojo ekestas pli regula kaj rapida ol la rivera, des pli, ke la Sudfrancan kanalon malavantiĝas limigita tonelaro.



La Sudfranca kanalo antaŭ la stacidomo Matabiau (Matabio) (inaŭgurita en 1866) de Tuluzo tiam tre ekspansiĝanta.

Evoluado de varveturado dum la XIXa jarcento

Jaro	1854	1856	1859	1879	1889	1896	1900	1909
Milionoj da tunoj-kilometroj	67	110	59	54	32	28	66	80

Antaŭ 1859 la kanalo funkcias sola, sed poste en la suda parto de Francio ekestas fervojoj, ĝian konkurencon klare pruvas la duoniĝo de varveturado inter 1859 kaj 1879. Poste, tiu veturado senĉese pli kaj pli etiĝas. Male, la

fervoja linio Bordoza-Sete jam atingas 200 milionojn da tunoj-kilometroj ekde 1860.

En 1898 la kanalon ekadministras la Ŝtato, kiu per sinsekvaj investaĵoj klopodas daŭrigi ĝian konkurenckapablon. La Ŝtato forigas taksojn kaj vojimpostojn, tiel relanĉante kanalveturadon, kiu atingos 80 milionojn da tunoj-kilometroj en 1909.

Laboristaj kaj socialaj kondiĉoj

Dum 15 jaroj proksimume 12000 laboristoj estas dungitaj por la kanala realigado : viroj kaj virinoj inter 20-30 aĝaj, kiuj formas grupojn sub estreco de iu ĝenerala kontrolisto.

La tuta laboro estas efektivigita mane. Por fosi la kanalon la laboristoj uzas ŝovelilojn, pioĉojn, plugpioĉojn. Ili mem devigas prizorgi ilaron; korbetoj kaj brankardoj servas por transportado de la materialo. La laboristaro konsistas el kamparaj kaj fabrikaj laboristoj; kelkfoje P.P.Riquet dungas militistojn.

La financaj kaj socialaj kondiĉoj de tiuj laboristoj estas tre favoraj kaj nekutimaj rilate pri tiu epoko : Salajrmonatigo por fideligi ilin, atribuo de malmultekostaj loĝejoj, dimanĉoj kaj festtagoj laborpigitaj, ripoztagoj pro malsano.

Komence la salajro estis duoble de terkulturista salajro sed ĝi malaltigas post malkontenteco de agrikolaj proprietuloj.

Pliaj laboraĵoj

En 1686 Vauban post kontrolo de la Kanalo trovas tiun- ĉi kadukstate. Li ordonas al A.Niquet aldoni novajn laborojn :

- truadon de tunelo (Cammazes) por plilongigi la kanaleton de la Monto
- plifortigon de la baraĝo de Saint Férreol por kontraŭstari sabloplenigon kaj ŝveligon de la kanalakvo, faritajn de flualtiĝo de riveretoj, kiuj alfluas en la Kanalon.
- labormasonaĵojn por apartigi la diversajn riveretojn kaj pliajn elversejojn
- konstruadon de akvedukoj kaj pontoj-kanalo.

Tiu kontraŭa serio daŭras ĝis 1694. Tamen la Sudfranca Kanalo ankoraŭ havas mankojn. Kaŭze de varia Garona fluokvanto oni konstruas la flankkanalon ĉe Garono por ĝisiri Bordoza(n). 1856 oni kreas vojkunigon kun Narbonne (1776) kaj Carcassonne (1810), urboj izolitaj de la kanalo ĝis tiam.

La kunligo inter la laguno Thau kaj Rhône finiĝas en 1808. La tutaj laboroj konstituas finfaron de la kunligo inter Atlantique kaj Méditerranée, pri kio revis P.P.Riquet.

La Verdaj Tigroj el Castelnaud

Source : Canal du Midi. *Wikipédia, l'encyclopédie libre.*

[http://fr.wikipedia.org/w/index.php?title=Canal_du_Midi&oldid=55301308.](http://fr.wikipedia.org/w/index.php?title=Canal_du_Midi&oldid=55301308)

FEDERACIANOJ, BONVOLU NE PLU KROKODILI!



Dominique vizias Nimozon

SUDFRANCGIA STELO



N^o 193 2a kvaronjaro 2010
2^{er} trimestre 2010

